



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 6-a de Marto 2017

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Eldad Salzman, Matilda Landaŭ, Dror Gaon, Asaf Ĥefec, Gabi Zeevi.

La Estraro esprimas siajn bondezirojn al nia kara estrarano, Ŝlomo Ŝaĥar, kaj deziras al li plej rapidan resaniĝon!

Okaze de la 70-a naskiĝtago, la Estraro esprimas siajn bondezirojn al nia kara estrarano, Jehoŝua Tilleman, kaj deziras al li ankoraŭ multajn venontajn naskiĝtagojn, en bona sano! (Dankon por la regalo!)

Protokolo de la antaŭa kunsido (9-a de Januaro 2017) – komentoj, kontrolo pri plenumado

Raportoj:

- a) Alvenis la revuo Esperanto kun 1/4-paĝa dorskovrila anonco pri la IK en Aŝkelono, pri la memorlibro de Josi kaj pri aliaj varoj de ELI (en la novembra n-ro, rete aperinta la 1.2.2017), kaj raporto de Amri pri la Zamenhofa Vespero de ELI (en la decembra numero).
- b) La Fondaĵo Hodler68 aprobis subvencion de 2000 eŭroj por la filmo pri Zamenhof, de la reĝisoro Zachi Schiff. Akompanis la peton 10-paĝa skripto tradukita en E-on de Amri. Temas pri 5-minuta video, la plena filmo kostus 100 mil eŭrojn. la subvencio estas grava atingo.
- c) Librofoiro de Jerusalemo, 11-15.6.2017 - Amri mendis minimuman budon (2x2m) 1250\$, retpaĝo --- <http://www.jbookfair.com/>
- ĉ) Aperis en la ELI-retejo la protokoloj de la janura kaj februara kunsidoj. Videble ĉe --- <http://esperanto.org.il/estraro.html>

1. La 18-a Israela Kongreso, 2017, Aŝkelon (Amri)

- a) **Aliĝoj:** ĝis la fino de februaro estas mendoj por 22 ĉambroj kun 44 loĝantoj, el ili 4 nur partoprenos nur vendrede, kaj 7 eksterlandanoj (el Litovio, Latvio, Rusio, Germanio kaj Usono). Edgar alvenos la 28/3.
- b) **AK/PK:** Amri mendis la gastejojn por la antaŭkongreso en Jerusalemo, Morta Maro kaj Eilat, kaj kompletan pakajon por Jordanio. Por la PK aliĝis nur 2 personoj, Jehoŝua mendis du noktojn en Haifa, en Port Inn. [*Intertempe aliĝis Jael kaj Aviagil*]
- c) Amri kompletigis la detalan programon, kaj dissendis ĝin per la ELI-listo. Dror enretigis la IK-programon. Jam estas modifita IK-programo (aldonita), Dror enretigu kune kun la AK/PK-programo.
- ĉ) Restoracio por ĵaŭdo vespere: Amri trovis la taŭgan tra la departemento de turismo en Aŝkelon --- "Scubar" en la Marino.
- d) Nomŝildoj - Jael preparis.
- e) Kongresa libreto - Amri preparos.



- 2 -

2. Finacoj (Ŝlomo) – li trapasis operacion en la hospitalo, li devas ripozi hejme. La temo estos rediskutebla venontfoje.

3. Eldonaĵoj kaj libroj (Amri)

- a) Israela E-isto: Amri pretigis la IE-162/163, duoblan n-ron vintro 2016/printempo 2017. 48p, disdonota dum la IK. Eldad kaj Gabi provlegas. Gabi finis, sendos al Eldad sian version, Eldad daŭrigos labori sur ĝi, kaj plusendos ĝin al Amri.
- b) Por komuna mendo de la nova libro "Bridge of words" de Esther Shor venis nur du petoj. Jagil proponis fari grupan mendon.
- c) Ulrich Lins pretis fari recenzon pri la Memorlibro de Josi, kaj tio aperos en la maja E-o.

4. Membro-kotizoj - Kiel instigi ne-pagantajn membrojn? (Jehoŝua) – *daŭrigota*.

5. Poŝtkesto - ne estas ankoraŭ solvita, la ĝisnuna filio fermiĝis, Jehoŝua provis kontakti la antaŭan filialestron, ĝis nun sensukcese. [*intertempe la problemo solviĝis, ni havas novan poŝkeston en nova loko! Sekve – ELI devis ŝanĝi sian oficialan leterpaperon*]

La venonta kunsido: lunde, la 3-an de Aprilo 2017, je 19:45

Protokolis: Gabi Zeevi